

# La Brita Esperantisto

Julio - Aŭgusto 1979

POPPI  
ANTIPIPISTA  
BREAKFAST  
FRÜHSTÜCK  
PETIT DÉJEUNER  
SANDWICHES  
TOAST  
WURSTELN  
ICE CREAM  
GEFRHORENES  
CAKES  
KUCHEN



CAMPARI

La

# Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE BRITA ESPERANTO-ASOCIO

75A Jaro, N-RO 830

Julio-Aŭgusto 1979

**Eldonas:**LA BRITA ESPERANTO-ASOCIO, 140 Holland Park Avenue, LONDON  
W11 4UF**Redaktoro:**

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuantoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭleĝaj.

UK ISSN 0007-067X

## *Form of Bequest*

I ..... give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

Support the Esperanto Movement's own Travel Agency by making all your Cross-channel Ferry bookings with us. Speedy and efficient service.

Esperanto Holidays Association,  
Nacton, Ipswich.  
Telephone: 0473-79300

# ESPERANTO PAROLATA

de Don Lord

“Ĝis la!”

“Deus esti, “Ĝis la *revido!*” iu severe korektas.

La vortoj ankoraŭ resonas en mia menso post pli ol tridek jaroj. Denove mi vidas la gravmienajn samideanojn, kaj aŭdas la voĉojn de la ‘korektaj’ parolantoj.

“Vi devus aldoni *-n.*”

“Ne en tiu okazo.”

“Mi kredas, ke jes.”

“Mi memoras, ke foje mia instruanto diris al mi . . .”

Esperanto *diskutata* estus pli ĝusta nomo por tia konversaciado. La koro de la komencanto glaciigas. Sajne, estas egale facile paroli latinon.

Kial, diable! ni tiel timigas lernantojn de nia *familia* lingvo?

En gazetoj kaj libroj oni rajtas atendi seneraran Esperanton, ĉar la verkanto havas tempon por kontroli, aŭ kontroliĝi. Eraroj korektendas. Ankaŭ en kursoj estas ĝuste korekti. Kaj se iu petas korektadon, kaj jam sufiĉe flue parolas, oni rajtas korekti. Sed nur en la Esperanta mondo troviĝas homoj, kiuj tiel senĉese, kaj nepetite—kaj ofte erare!—‘korektas’.

Kiam ni parolas nian denaskan lingvon, ni foje eraras, ni ellasas vortojn, ni parolas hezite. Ni lasu al ni la saman liberecon parolante Esperanton.

Mi estas ege dankema al tiuj samideanoj, kiuj dum mia junaĝo korektis miajn erarojn—“ĉiuj la”, “da tiu”, k.c. Sed mi eĉ pli dankemas al tiuj, kiuj permesis al mi flue kaj rapide *paroli* dum la fruaj jaroj de mia Esperanta vivo. Se oni estus interrompinta min je ĉiu eraro, mi ankoraŭ balbutus. (Eble kelke da samideanoj nun bedaŭras, ke oni ne tiel bredis al mi la langon!)

Esperanto estas lingvo ne sole por kleruloj, por tiuj kun universitataj diplomoj. Gi estas ankaŭ lingvo, kiu egale

apartenas al la simplaj homoj de la mondo. Tia kreis ĝin Zamenhof, kaj tia ĝi restu!

Pro tio, ke en la komenco Esperanto estis disvastigata per libroj, antaŭ ol homoj interparolis per ĝi, la unua formo de la lingvo estis iomete formala. Sed en Bulonjo ĉe Maro en 1905 la familio internacia komencis vere interparoli. Tie oni semis la *Esperanton parolatan*, kiun ni fiere reklamas per insignoj kaj glumarkoj.

Kiel ni povas antaŭenigi ĝin? Unue, per paciencita aŭskultado al ĉiu, kiu, kiom ajn hezite, ekparolas ĝin. Tiel ni paroligos la parolanton. Due, per uzado de la lingvo tiom ofte, kiom eble. Ni inventu vortojn. Ni ŝercu, ni ridu, ni ĝuu la lingvon. Ni eksperimentu. Ni eĉ kontrolu en la vortaroj! Kaj ni ne tro grave taksu nin.

Granda nombro da maloftaj vortoj ne nepre implicas gravan temon. La poezio de la Biblio estas en simpla hebrea lingvo, kaj ĝia vortprovizo estas malgranda, sed ĝi estas unu el la beletraj ĉefverkoj de la mondo. La hinda *Bagavadgito*, la ĉina *Dao De Ĝing*, kaj aliaj ĉefverkoj, simile atingas la celon per plej simplaj rimedoj. Ni ne hontu se ni ne havas grandan stokon da vortoj. Ni hontu, tamen, se ni povas kapti la subtilon de japana poemo, sed ne povas paroli nature kaj simple kun naturaj kaj simplaj homoj. Esperanto estas parolilo por vivaj homoj. Por tio Zamenhof ĝin kreis.

Mi ne intencas subtaksi la beletristojn. Estis ofte tiuj, kiuj pli grandigis nian vortprovizon kontraŭ la protestoj de la simplisma skolo. Sed oni povas trotaksi la literaturon. Oni povas forgesi la vivan homon, kiu parolas.

Niaj vortaristoj, niaj Akademianoj, ne ĉiam helpas nin. Estas kuriozaĵo de la Esperanta mondo, ke niaj vortaroj donas vortojn por *onomatopoea* aŭ *ricinoleate*

(onomatopea kaj *ricinolato*, komprenebla!) sed, ke ankoraŭ ni diskutas kiel diri en Esperanto *blue jeans* aŭ *lavatory bowl*. La unua estas vesto portata tra la tuta mondo, kaj la dua utila afero ekzistas jam de pli ol jarcento. Saluton! do, al ĉiu, kiu helpas nin per kreado de bezonataj ĉiutagaj vortoj—*juke box*, *crash helmet*, *kick-start*, *book token* k.t.p. Ankaŭ saluton! al tiuj, kiuj gvidas nin al malofte uzataj vortoj por ĉiutagaj aferoj jam troveblaj en *Plena Vortaro* (jes!), kaj *vulgarigas* ilin.

Troviĝas inter britaj Esperantistoj pluraj homoj kapablaj tion fari. William Auld, Reto Rossetti kaj John C. Wells estas konataj kiel homoj, kiuj ne nur kreis kaj kreas tiajn vortojn, sed ankaŭ pacience parolas kun lernantoj. Estas aliaj, kiuj same faras. Sed ne sufiĉaj.

Eble oni diros, “Sed jam ekzistas Esperanto parolata. Estas multe da denaskaj Esperantistoj en la mondo—eĉ Esperantaj familioj. Ili parolas inter si en la hejmo.” Ja jes! sed ĉiuj tiuj devas solvi por si multe da problemoj. Kaj se ili solvis, iliaj solvoj troviĝas nek en niaj vortaroj, nek en nia ĝenerala konversaciado.

“*En konsultaj rilatoj kun UNESKO.*” Jes kaj grava afero. “*Tradukoj de la ĉefliteraturo de la mondo.*”—ankaŭ grava. “*Esperanto parolata*”; laŭ mi, eble la plej grava el ĉiuj. (Volapuko fiaskis ĉar plejparte ĝi restis lingvo nur skribata.)

La unua el tiuj tri (rilatoj kun UNESKO) estas fakto. Ankaŭ la dua estas fakto, kaj oni daŭre tradukas. Sed Esperanto parolata—flue, ĝoje, facile parolata—estas por tro da homoj ankoraŭ nura revo. Ni devas, do, aparte trakti tiun aferon kiel vere gravan.

Ni havas nian lingvon. Ni havas tradukitan kaj originalan literaturon. Ni estas agnoskataj de registaroj. Nun ni entreprenu pluan celon—la efektivigon de flua, ĉiutaga Esperanto universale parolata. *Ek!* samideanoj, kaj *Ĝis!*

### NIA KOVRILO

Moderna Venecia Komercisto. (Foto: Raif Markarian).

### GRAVA KOREKTO

En la raporto pri la 63a Kongreso, Cheltenham, kiu aperis en la lasta B.E., estis grava eraro. Andreo Sidworth kaj via Redaktoro ambaŭ permesis deklari, ke la brila prezentado de “La Piratoj de Penzanco” estis prezentita de Gloucester Grand Opera Group. Tiel *ne* estis. Kompreneble, tiu gratulinda grupo estis bristolanoj, kiuj nun nomas sin “La Esperanta Opero-Societo”, kaj ni esperas revidi kaj reaŭdi ilin ofte en la estonteco. Ne tre petas ilian pardonon pro la eraro.

### ESPERANTA DISERVO LONDONA – SANGO DE PREĜEJO

Ek de Novembro 1951 ĝis nun, dum pli ol 27 jaroj, la Esperantaj Diservoj en London okazis ĉe la Franca Protestanta Preĝejo en Soho Square. Sed la aferoj de la Francoj necesigas, ke de la unua de Majo ĉiun jaron tiu preĝejo ne estas libera por la uzo de aliaj ol la Francoj mem. Do, kaj la Esperantistoj kaj la Poloj kiuj ankaŭ havis ĉiumonatajn Diservojn tie devis subite trovi alian lokon kie ili povas kunveni por la Diservoj. Tre bone estas ke la sekretario de la Esperanta Diservo estis gvidata al West London Mission por peti helpon. Pastro Dr. J. A. Newton ĉe la West London Mission, kiu estas Metodista, bonvole permesas al la Esperantistoj la uzon de la kapelo ĉe Kingsway Hall, London, W.C.2. Je la 13a de majo okazis la unua Esperanta Diservo en tiu Metodista Preĝejo, sekve estontaj Diservoj estos tie almenaŭ dum monatoj, eble eĉ dum jaroj. Facile estas por la Esperantistoj kune temaĝi ĉe Kingsway Hall ĉar estas bona kantino tie. Ĉiuj Esperantistoj kaj amikoj estos bonvenaj ĉe la Diservoj Kristanaj, do ne hezitu sed venu la duan dimanĉon ĉiumonate, krom aŭgusto kiam ne estas Diservo, al Kingsway Hall por partopreni kaj la Diservojn kaj amikan rondon Esperantistan. La subtera stacidomo plej apuda al Kingsway Hall estas Holborn, Central kaj Piccadilly Lines.

A. D. Debenham,

Hon. Sek. Esperanta Diservo Londona.

## NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO

*Ni citas el interesa raporto aperinta en "Komuna Esperanto-Gazeto", pri la Nederlanda Esperanto-Kongreso okazinta de la 6a ĝis la 8a de majo 1979, en Beekbergen:*

Post la manĝo sekvis varia vespero kun nederlandlingva prelego de s-ro H. Aben, redaktoro de la organo de la Eŭropa Movado en Nederlando. Li esprimis sian opinion, ke la lingva diverseco ja estas ĝena, sed ne tro. Li montris al landoj plurlingvaj, kiel ekz. Belgujo, Jugoslavio, kaj Svisujo, kaj asertis, ke, ekz. en Svisujo, la plurlingveco apenaŭ ĝenas. En la diskuto s-ro Claude Piron, sviso kaj (iama) tradukisto ĉe UN, atentigis pri tio, ke la plurlingveco, ekz. en la svisa parlamento, estas granda ĝeno, ke la afero tute ne bone funkcias. En sia prelego, dimanĉon posttagmeze, li revenis al ĉi tiu afero, rakontante ke la franc- kaj itallingvanoj estas diskriminaciataj malplimulto. Kiam diskuto okazas en la germana, ne-germanlingvanoj provas paroli germane, ĉar estas psikologia tendenco ne transiri al alia lingvo. Tamen, se la malfacilaj farigās tro grandaj, iu transiras al la franca aŭ la itala, ĝis poste denove la germana reprenas sian superregan pozicion. Tamen la "Germanlingvaj" svisoj ja skribas "altgermanan" lingvon, sed inter si parolas svisgermanajn dialektojn, kaj ho ve, emas uzi tiujn ankaŭ en la parlamento, kio tuj elvokas protestojn de la alilingvaj malplimulto, kiuj ja pli-malpli lernis la altgermanan, sed ne komprenas la svisgermanajn dialektojn! — Nu, tiel "bone" funkcias la trilingveco (la romanĉa tute ne havas ŝancon!) en la svisa parlamento . . .

Posttagmeze Claude Piron . . . majstre prelegis pri "Problemoj pri komunikado en internaciaj medioj", pri la problemoj de komunikado inter eksterlandaj turistoj kaj ekz. lokaj ĝendarmoj, la komunik-problemoj de gastlaboristoj, sed ankaŭ pri la problemoj de tro lacaj, ĉar per laboro tro superŝutitaj kaj superŝutitaj

tradukistoj, kiuj en tiuj kondiĉoj komencas fari erarojn, ofte gravajn, kaj pri la problemoj de interpretistoj (ĉe samtempa interpretado), kiuj ne ĉiam bone komprenas la pli-malpli fuŝan prononcon de homoj parolantaj nepropran lingvon, ekz. ne ĉiam scias, ĉu iu diras "thirty" or "thirteen", ktp, aŭ simple preteraŭdas esencan elementon kaj pro tio misinterpretas kaj tiel eventuale kaŭzas kompletan miskomprenadon kaj vanan diskutadon. Kaj tamen "politikistoj" opinias, ke ne ekzistas kialo, entrepreni ion por ŝanĝi ĉi tiun situacion.

Poste parolis, optimiste, prof. d-ro H. Tonkin pri la "Perspektivo de Esperanto". El la fakto, ke nun ĉe ni kaj en okcidenta Eŭropo entute la nombro de la organizitaj esperantistoj estas nur ono de la nombro en la tridekaj jaroj, ni ne malĝuste konkludu, ke la morto estas proksima. Ni ne apatie atendu nian forpason, sed faru nian eblon, fosu nian sulkon.

### "HOLLY ROYDE", OKTOBRO 1979

Kiel kutime, la Universitato de Manchester organizas semajnfinan diskutaron en Esperanto, ĉifoje ekde la 27a de oktobro, vespere. La kurso baziĝas sur prelegoj en Esperanto far specialistoj pri siaj fakkampoj, ŝed celas nespecialistan auskultantaron. Ĉijare la prelegoj inkluzivos tri de Prof. Stanley Nisbet (Universitato Glasgow): (a) Disciplino en hodiaŭaj lernejoj; (b) Novaj ideoj pri edukada taksado; (c) Diskutado kiel lernmetodo en la universitato. Prelegos ankaŭ D-rino Marjorie Flint pri biologi-kemiaj temoj, kaj la Direktoro D-ro Cavanagh pri fizikaj aŭ pli ĝeneralaj temoj.

La inkluziva kosto de la semajnfino estas, por lokaj studentoj £20,20, por aliaj £23,20. Por aliĝi, skribu al Mrs Lyn Palethorpe, Extra-Mural Dept., The University of Manchester M13 9PL, antaŭ la 13a de oktobro. Ne prokrastu, ĉar la nombro da lokoj estas limigita.

## NOVA MAGAZINO

Verdulĉjo portis al la kluba kunveno provnumeron de nova magazino, laŭdire baldaŭ aperonta. Tiu magazino estas en E-o kaj skribos pri eventoj de la tuta mondo. Poste en la “Ora Săfelto”, kiam la biero vigligis niajn mensojn, Lucia, kiu trinkis ĝinon anstataŭ bieron, kaj eble pro tio la menso vigliĝis pli rapide, proponis ke ni redaktu kaj eldonu semajnan magazinon pri eventoj en la Verda Mondo. Estas multaj interesaj okazintaĵoj, kiujn la nunaj revuoj kaj gazetoj ne mencias. Dum nur horo da pripensado ni havis sufiĉe da indaj novaĵoj por plenigi pli ol kvar paĝojn de “H— de E—”.

Jen specimenaĵ elĉerpaĵoj de nia nova magazino!

**LA VERDA SEMAJNO** estas sentima kaj sendependa eldoniĝo pri la ĉiutaga vivo de la Verda Popolo. **LA VERDA SEMAJNO** estas pri homoj por homoj!

**Nova Konstitucio Jam Skribita.** Duon-oficialaj fontoj asertas, ke estas optimismo pri la aprobo de la nova konstitucio far la Universala Asambleo. La nova konstitucio instigos al la registaro elektota en Stokholmo prezenti al la Verda Mondo impulsigeman stimolon kaj klare difinitan iniciaton por fronti, per modernaj metodoj racie kaj kohere prilaboritaj, la gravajn jarojn okdekajn, kiam la Verda Popolo devas esti en la avangardo de la eventoj por la centjara jubileo. Al demando pri la diferenco inter la nuna kaj la nova konstitucioj, vic-subsekretario de la Komisiono respondis: “Iuj vortoj tie kaj ĉi tie!”

**Intensivigo de 140.** Konfidenca raporto prezentota al la Direktorado de BEA alvenis nian oficejon. Ĝi estas acerbe kaj aplombe detalita. Verkis ĝin la Financa Direktoro laŭ la peto de neniu. La raporto deklaras ke BEA, estante nun komerca entrepreno, nepre devas realigi la potencialon kiu ekzistas en ĝiaj restantaj posedaĵoj por intensivigi la komercan rendimenton kaj maksimumigi la

enpagojn. Inter la eroj proponitaj troviĝas:

- lui la oficejon al EAB por uzado dum la noktaj horoj
- utiligo de la presilo tage kaj nokte per laboro de volontuloj kaj intensivigi la presadon de popularaj libroj
- transformi la kelon por uzo kiel saŭno dum tago kaj tranoktejo dum nokto por Verduloj vizitantaj Londonon
- homoj, kiuj skribas al BEA, sendu jam tajpitajn respondojn al siaj leteroj por spari la tempon de la oficeja stabo
- kolekti kaj vendi al entomologaj laboratorioj anobiojn, kiuj abunde brediĝas en la Domo

Kiam ni parolis telefone kun la FD, li respondis acide ke estas neniu komento. “Oni devas aktualigi la Asocion,” li fine diris.

**Adelino Por UK?** Aŭdiĝas onidiroj ke Adelino, bonkonata al la adeptoj de “La Kancerkliniko”, debutos dum la Arta Vespero en la venonta UK. Nia raportisto parolis al Adelino dum ŝi bronzigis sin en la ĝardeno de sia vilao. “Jes, estos plezuro al mi montri mian prezentaĵon en UK. Ĉar samideanoj ne facile entuziasmiĝas per rutina nudigo, mi intencas samtempe kanti novan atitaĵon.” Al la demando, ĉu ŝi nudigos komplete, ŝi respondis: “Jes! Tute komplete . . . , ĝis la ostoj!”

**Portu Kilton!** Sunita Raima, la fama radio-parolantino, deklaris dum festeno benefice al EAB ke ŝi aŭde atendas la Britan Internacian Konferencon en Skotlando por renkonti tiujn kvin bonkonatajn bardojn de la Verda Literaturo. Kiam oni demandis, kiu el la kvin estas de ŝi plej ŝatata, Sumita respondis: “Mi decidis post kiam mi vidis ilin en kiltoj!” Post klarigo ke temas pri poezio ŝi diris: “Pardonu min! Pri poezio . . . , lin, kiu verkis tiujn sonetojn.”

**Mirakla Skapo.** Fiat 128 veturante laŭ

la M6 senkontroliĝis kaj falruliĝis laŭ deklivo ĝis la malsupro. La Polico miras kiel la kvin okupantoj de la aŭto ne ricevis eĉ kontuzon. "Ni reiris al nia hejmurbo de federacia kunveno en Tajdoĉeni" diris la kondukinto "ni kantis por gajigi la tempon kaj je la tria refreno de 'E-o estas la lingvo por ni' mi emociiĝis kaj KRAAŜŜ! la aŭto estis sur la herbo!" "Ni ĉiuj portis la verdan stelon, eble tio helpis nin," diris pasaĝerino.

**Al Novaj Aventuroj.** La du aŭdacaj vojaĝantoj Nod kaj Ĉot pretigas sin por aŭtomobila vojaĝo al Brazilia tra la amerikaj ĝangaloj. Raportistino renkontis ilin ĉe la Centra Oficejo. "Ni ĵus akiris la librojn 'Poŝatlaso de la Mondo' kaj 'Bildlibro pri Bestoj'. Ni uzos ilin dum nia vojaĝo. Unu por trovi la vojn kaj la duan por identigi la bestojn, kiujn ni vidos" diris Nod. "Ĉu vi verkos pri viaj aventuroj?" "Kompreneble, mi havos sufiĉe por verki senfinan felietonon". Aldonis Ĉot: "Aventuroj certe prezentigos!" Nia raportistino trovis ilin afablaj, kiel kutime, kaj tre entuziasmaj pri la evento. Bonan vojaĝon al ili!

Do, legantoj karaj, sendu amase respondkuponojn kaj vi ricevos kompenso numeron de la ofseta ilustrata magazino **LA VERDA SEMAJNO**.

**Alariko.**

**Daphne Lister**

### **PENSOJ POST "BRAND"**

Agamemnone vi la idon donis ofere  
Kun ĉio "idola",  
Staris sola.  
Obsedite, vian "principon" vi prelegis,  
Senkompaton fere flegis,  
Aŭ ĉu?  
Nu,  
Vi tamen ardis, Brand,  
Fajroŝtipo en glacia land';  
Ne dishakis vin  
Venĝema edzin',  
Vi agis senpere.

## **NEKROLOGO**

**S-ino G. P. Weston,**

**Kantistino kaj Esperantisto**

S-ino G. P. Weston estis bone konata kaj multaj Esperantistoj bedaŭros, ke ŝi mortis je la 27a de majo, 1979. Ŝia forpaso estis paca sed post kelkaj semajnoj da malsano en hospitalo. Oni aranĝis, ke la funebra solenaĵo estu ĉe la preĝejo Sankta Johano Vianney, West Green Road, London, N.15 je la 10a horo matene jaŭdon la 7an de junio, 1979. Ŝi havis pli ol 80 jarojn.

Dum multaj jaroj S-ino Weston estis profesia kantistino kiu kantis kaj angle kaj Esperante. Nelonge post la unua mondmilito ŝi tre multe helpis al S-ro M. C. Butler kaj aliaj pri traduko de kantoj en Esperanton, kiam S-ro Butler kompilis la libron "Kantaro Esperanta". Do, ŝia antaŭedziĝa nomo, F-ino G. P. Cosmetto, aperas almenaŭ deksefoje inter la nomoj de tradukintoj ĉe la finoj de diversaj kantoj. La libro eldoniĝis dum la jaro 1926 kaj F-ino Cosmetto helpis tiom multe al S-ro Butler, ke ŝi estas menciata en la antaŭparolo inter tiuj malmultaj kiuj ricevis tiel specialajn dankojn. En la jaro 1922 la tiama F-ino Cosmetto havis eĉ pli specialan sperton bonan kiam ŝi antaŭ la mikrofono kantis Esperante kanton por la tiama radio kiu nomiĝis "2LO The London Station" kaj sekve ŝi povis diri, ke ŝi estis la unua kiu kantis Esperantan kanton dissenditan per la "Wireless" kiu estis la angla nomo por radio en tiuj tagoj.

Ofte S-ino Weston ĉeestis la Diservojn Esperantajn en London, kie ŝi de tempo al tempo per sia dolĉa voĉo solkante donis grandan plezuron al ĉiuj aliaj ĉeestantoj. En decembro 1953 ŝi estis unu el la ĉefkantantoj en la floro el 18 kantantoj kiam S-ro L. I. Gentle prezentis sian Esperantan tradukon de "Betelehem" kiun faris angle originale S-ro Maunder. La plej lastaj solkantoj de S-rino Weston ĉe Kristnaskaj Diservoj okazis antaŭ nur kvin aŭ ses jaroj kaj ŝi ankoraŭ havis dolĉan voĉon.

A. D. Debenham.

Geoffrey Chaucer

## LA RAKONTOJ DE CANTERBURY

### La Absolvanto

Lin akompanis Absolvanto pia  
El Runcivalo, kamarado lia,  
Ĵus reveninta el kortego roma.  
Kantadis li kun voĉo klariona:  
"Ho kara, min ne lasu en sufero!"  
Kun harmoni' basvoĉa de l'Somnero;  
Pli laŭta ol trumpeto la kunkanto.  
Hararo flava de ĉi Absolvanto  
Simile al linfasko pendis glate;  
En ratovostoj ĝi kuŝiĝis plate  
Sternita sur la ŝultroj en konfuzo.  
Ĵi rajdis sen kapuĉo por amuzo—  
Ĝi estis en saketo forpakita.  
Favore al la nova mod' inklina,  
Li rajdis kun la haroj en malordo,  
Portante nur ĉapeton sur la verto.  
L'okuloj, rigardaĉaj por esploro,  
Elstaris kiel tiuj de leporo.  
Li garnis per verniklo la ĉapeton;  
Rajdante, tenis antaŭ si saketon  
Plenegan de absolvoj ĵus el Romo.  
Kaprina estis lia voĉa tono;  
Virecan barbon li neniam havis,  
Sed glatvizaĝon kvazaŭ li ĝin razis,  
Kaj ĵuras mi sen iom da hezito,  
Li ĉevalino estis aŭ kastrito.  
Sed laŭ metio en la tuta lando  
Li estis senegala Absolvanto.  
Kusenkovrilon li en sak' konservis:  
"Vualo Virgulina!" li asertis.  
Li diris, ke velpeco lia venis  
De l'barb' el kiu Petro ekpromenis  
Sur maro, kaj Jesuo mem lin savis.  
Juelan krucon, el latun', li havis.  
Plenigis nur porkostoj lian glason.  
Do kiam trovis li kamparan pastron  
Li trompe gajnis pli en unu tago  
Ol dumonata pastra laborpago.  
Per mistifiko, dum li false flatis,  
La pastron kaj popolon li trompaĉis.  
Finfine—al merit' ne estu blinda—  
Li estis ja ekleziulo inda.  
Legendon, lecionon, li bonege  
En la preĝejo ĉiam sciis legi;  
Sed li, servante sian religion,

Plej bone kantis la ofertorion,  
Ĉar bone sciis li, ke post la kanto  
Prediki devos li kun glata lango  
Por mona gajn' en kio li superis,  
Kaj tial li inspiran voĉon levis.

**Absolvanto:** Vendisto de papaj indulgencoj.

**Verniklo:** Faksimileto de poŝtuko de Sankta Veronika, kiun ŝi laŭdire pruntis al Kristo sur la vojo al Kalvario.

**Runcivalo:** La Hospitalo de Runcivalo, religia gildo establita en Charing Cross, Londono, 1385(?)

Trad. W. B. Johnson.

## PRI LA ORIGINO DE "EDZIN"

En "Israela Esperantisto", majo 1979, aperis longa, interesa artikolo pri la supra temo. En 1958 nia senlaca samĵideano N.Z. Maimon skribis al "Jidiŝe Ŝpraf" (Jida lingvo), organo de la supera jida scienca instituto "Yivo" en Novjorko. La kerno de lia demando estis: "Ĉu ekzistas en la jida lingvo la sufikso *ecin*? Se jes, de kie ĝi devenas? Mi konas nur unu solan vorton: *Rebecin* (edzino de Rabeno) . . . La demando leviĝis inter E-istoj. Zamenhof elektis la finaĵon *edzin* por indiki virinon edziniĝintan . . . Zamenhof mem respondis al demando pri tiu sufikso, ke li tiris ĝin el *Kronprinzessin*. Last-tempe iu rimarkigis, ke la sufikso *ecin* troviĝas en la jida kaj Zamenhof tiris ĝin rekte el tiu lingvo. Estas konate, ke ekde sia juneco Zamenhof forte amis la jidan lingvon . . . Verŝajne li havis ian kaŭzon por diri, ke li prenis tiun sufikson el la germana, sed *Kronprinzessin* estas ofte virino ne edziniĝinta, eĉ juna knabino".

La redaktoro de "Jidiŝe Ŝpraf", Judl Mark, tre detale diskutis tiun demandon, kaj fine diris jenon: "Nu, el la supraj klarigoj vi povas elekti tiun, kiu plaĉas al vi, sed staru firme sur tio, ke *-edzin* en Esperanto devenas de *Rebecin*".

S-ro Maimon plue atentigas: "La literon c Zamenhof ŝanĝis al dz (edzino, edzo), ĉar *eco* li destinis por esprimi kvaliton".



## La Vorto-Borso, n-ro 1

La tradicio de lingva konservatismo kaj la kondiĉoj sub kiuj Esperanto evoluas havis kiel rezulton, ke—ne malofte—estas iom malfacile trovi taŭgan ekvivalenton en Esperanto de tiu aŭ alia termino en la angla; kvankam la koncerna koncepto estas konata en pluraj landoj kie oni parolas Esperanton, se ne en ĉiuj.

La celo de ĉi tiu nova rubriko estas krei rimedon por la interŝanĝo de ideoj por solvi tiujn traduk-problemojn, kaj prezenti al la publiko la modelajn solvojn tiel atingitajn.

Do ekde n-ro 2 en la serio, la rubriko ĉiam havos du partojn: solvoj serĉataj, kaj, solvoj donitaj.

Por starti ni donas ĉi-sube iom arbitre elektitan liston de problemoj (kun klarigoj en Esperanto por nia internacia legantaro), sed ekde la venonta aperigo de nia rubriko ni esperas prezenti problemojn ensenditajn de la legantoj mem. Sendu do viajn problemojn al: *Language Services, 17 High St., St. Peter's, Broadstairs, Kent*—kiel ankaŭ viajn komentojn pri nia aktuala listo.

Ni bonvenigas ĉiujn sugestojn, kaj aparte bonvenaj estos informoj pri tradukoj en aliaj naciaj lingvoj de la anglaj vortoj/esprimoj tradukotaj en Esperanton.

Jen nia starta listo:

### 1. *Jet-lag*

(laco kaj misorientiĝo kaŭzata de rapida transiĝo de unu horzono al alia, kiam oni flugas okcidenten aŭ orienten)

Modela frazo —

*Still jetlagged and suffering from a hangover, I was in no fit state to meet my far-eastern counterpart.*

### 2. *Dishwasher*

(aŭtomata lavmaŝino por teleroj, manĝilaro, ktp—nuntempe ofte

trovebla en la kuirejo)

Modela frazo —

*My wife wants a dishwasher that will take an 8 place-setting load.*

### 3. *Charge*

(sumo de mono postulata por servo far firmao)

Modela frazo —

*Due to increased labour-costs we have been obliged to raise the installation charge to £45 for new subscribers.*

### 4. *Make love to*

(komunlingva sed ne triviala esprimo por koiti)

Modela frazo —

*And did you on this or any subsequent occasion make love to Miss Smith?*

### 5. *Dipped headlights*

(utiligo de tiu filamento en aŭtolampo, kiu estas tiel lokita rilate la reflektilon, ke la fasko de lumo estas direktita al la ŝoseo kaj iom flanken—kaj do ne blindumas renkontitan trafikon)

Modela frazo —

*Driving test examiner's question: under what conditions would you drive on dipped headlights in the daytime?*

### 6. *Sorting office*

(loko kie oni fizike apartigas poŝtaĵojn destinitajn al diversaj adresoj)

Modela frazo —

*Letter bomb scare. A million letters frozen at Birmingham sorting office.*

### 7. *Hard-boiled egg*

(ovo tiel longe enŝeले kuirita en bolanta akvo ke la tuta ovo — blankok. flavo — solidiĝas)

Modela frazo —

*Our rations for the journey were two hard-boiled eggs, an apple, and a buttered roll.*

### 8. *Deposit account*

(speco de ŝparkonto ĉe banko kiu donas interezon, sed kiu ne estas ĉekkonto)

Modela frazo —

*Interest on bank deposit accounts is usually due in June and December; so your assessment for the Tax Year 78-79 under Schedule D would be based on the interest receivable in June 77 and December 77.*

## UNUDENTA SANKTULO

Pri kio rakontu esperantisto, verŝajne inter la plej izolitaj esperantistoj en la mondo, loĝante en oazo de la Saharo, en suda Tunizio?

Eble pri la loka folkloro, kiun rakontis al li la plej maljunaj homoj de la oaza vilaĝo, kiam li laboris tie en dispensario? Ni registru tiun folkloron, antaŭ ol ĝi malaperos sub la sablo kaj la progreso.

Antaŭ kvar jarcentoj, venis el Maroko maljunulo profunde pia, kaj haltis iom distance de la oaza vilaĝo, Zaouit-el-Arabe. Tie li konstruis malgrandan moskeon, kie li mem loĝis, kaj gastigis tiujn pilgrimantojn, kiuj malfacile vojaĝis el suda Maroko kaj el Alĝerio al Mekko, per la iom tempoŝpara vojo tra suda Tunizio.

Tiu noblakora maljunulo volis iom provizi siajn piajn gastojn; do li pene plantis arbojn en la ĝardeneto de la moskeo: daktilpalmon, olivarbon kaj aliajn fruktarbojn. Ili bone kreskis, kaj iĝis fruktodonaj; sed tiam li mem ne povis manĝi siajn fruktojn, ĉar li estis tiel maljuna, ke li perdis ĉiujn dentojn. Iun tagon, meze de siaj gastamaj laboroj, li tiel forte deziris tamen mem gustumi siajn fruktojn, ke li preĝis, "Ho, mia Dio, mi petas vin, donu al mi nur unu denton, por ke mi povu iom mordi kaj gustumi tiujn ĉi bonajn fruktojn!"

Kiam li vekiĝis matene, unu bona granda dento estis plantita en lia buŝo!

Poste la homoj nomis lin, "*Bu Nab*" kiu en la araba lingvo signifas, "Unu sola dento".

Iam, viro, kiu scipovis nek legi nek skribi, vizitis la sanktulon, dezirante studi la Noblan Koranon en la moskeo, kie estis lernejo por la Korano. Bu Nab etendis manon kaj tuŝis la kapon de la nescianto, kiu, kun granda surprizo, tuj komencis legi la Noblan Koranon, kvankam li ne akiris la kapablon skribi ĝin.

Stelisto venis nokte, por pluki la

daktilojn de la pene plantita palmo en la moskea ĝardeno. Sed kiam li grimpis la palmon de la sanktulo, lia palpanta mano tute ne povis trafi daktilojn. Finfine, mirante, li decidis descendi; kiam liaj piedoj sentis la grundon, li delasis la trunkon. Sed tiu grundo estis iluzia; li longe, longe falis, kaj adiaŭ, ŝtelisto! Matene oni trovis lian kadavron sub la palmo de la sanktulo.

Antaŭ sia morto, Bu Nab profetis al la loĝantoj de la vilaĝo, "Ĉiuj viaj novaj domoj estos proksimaj al mia moskeo, kaj via malnova vilaĝo estos ruino." Kaj ĝuste tiel okazis; kaj nun la moskeo estas inter la domoj de la nova vilaĝo Zaouit-el-Arabe. Ankoraŭ la bastono de la sanktulo troviĝas en la moskeo, de kie oni alportas ĝin kiam vilaĝa virino akuŝas, por ke ŝi ne sentu dolorojn. . . .

Ankoraŭ, ĉiujare post la rikolto de daktiloj, okazas la granda festo *Fezaa*, kiel ni nomas ĝin en suda Tunizio, honore al nia sanktulo Bu Nab. Estas vere admirinda festo, precipe kiam la dancistoj, en siaj antikvaj vestoj, pafas per siaj malnovaj fusiloj, "karabiloj".<sup>1</sup> Preskaŭ ĉiu familio portas grandan lignovazon da kuskuso al la moskeo, por gastigi la multajn vizitantojn, kiuj ankoraŭ vizitas la tombon de nia unudenta sanktulo, Bu Nab.

**Grine Abderrahman kaj  
Marjorie Boulton.**

1. Eble parenca lingve al *karabeno*?

## ALIA PETO EL MALRIĈA LANDO!

S-ro Lenio MAROBIN, Washington Luiz, 189, 95900 Lajeado-RS, Brazilo, zorgas pri Esperanto-grupo kie tre malkas lernolibroj, literaturaĵoj, gazetoj ktp. Kiu povos helpi?

Nova Esperanto-Klubo fondiĝis en Sri-lanka kaj la Bibliotekisto, S-ro D. B. Jesudason, 71 Pagoda Road, Nugegoda, Ŝrilanka tre bonvenigos lernilojn kaj legaĵojn por komencintaj anoj. Ne eblas facile aĉeti de eksterlandaj libroservoj.

## ESPERANTO – Eskapilo aŭ Edzkaptilo?

Mi estas studanto de la homa naturo. Ĉiam plaĉas al mi observi homojn, la agojn, reagojn, kaj la sintenojn, kaj konjektu pri la motivoj. Tion mi faris en la ĉiutaga vivo ĝis mi eklernis Esperanton, kiam subite alfrontis min abundo da studmaterialo, nome la Esperantistoj.

Kial ili Esperantistiĝis? Kion ili celas? Dum la diversaj atingebaj renkontiĝoj mi atente observis la vizaĝojn kaj la eldiraĵojn, kaj ŝajne estis multe da kialoj por la aliĝoj al nia movado—vere mi ne povis elekti unu ĉefan kialon ĝis, dum la Brita Kongreso en Cheltenham, mi audis diskuton inter du verdulinoj pri iu nova kanto kies rekantaĵo komenciĝas jene:-

“Mi eklernis Esperanton por eviti la edzinon, ja, ja, ja.”

Mi tuj konstatis, ke jen grava kaj ebla kialo. Mi ririgardis la ĉeestantojn kaj rimarkis la tre evidentan mankon de geedzaj paroj. Estis multe da inoj kaj malinoj, sed ili tute ne konstante geis.

Nu, antaŭ ol daŭrigi mian verkaĵon mi deziras peti al la verkist(in)o(j) de la supra kanto sendi kopion al la redaktoro de B.E. por ke li inkluzivu ĝin en venonta numero de la gazeto, ĉar mi certe scivolos pri la cetero.

Nu, rilate denove al mia temo, mi komencis pensi pri la vero de la esprimo en tiu verso. Ĉu vere multe da malinoj aliĝis la movadon por eviti la edzinon? Mi decidis ke certe bezonatas pli da tempo por studi la problemon, kaj mi ellaboris planon. Mi ekkomencis la laboron en mia loka klubo, elektante kelkajn malinojn por studi, kaj mi baldaŭ rimarkis, ke ili alportas siajn edzinojn nur al la plej tedaj okazaĵoj kiel, ekzemple, federaciaj kunvenoj—la viglajn, amuzajn okazaĵojn ili ĉeestas solaj. Nu, kion ili celas? Ĉu ili deziras ŝajnigi ke verdaj okazaĵoj estas tute ne interesaj? Ĉu, por la inregatoj, la Esperanto-klubo estas

azilo? Ĉu troviĝas tie la intelektaj stimuloj kiuj mankas en la inregata hejmo? Tian impreson mi certe gajnis.

Rilate al mi mem, vi ĉiuj jam scias ke mi havas hejmajn respondecojn—mi jam menciis miajn du infanojn en pasintaj artikoloj. Nu, mi ĉeestas Esperantajn renkontiĝojn sola, ĉar iu devas prizorgi la infanojn ĉu ne? Por mi estas la bezonataj stimuloj en la hejmo, sed mi kredas ke mi devas havigi al kiel eble plej multe da Esperantistoj la eblecojn profiti de mia sperteco!

Do, pritraktinte la malinojn, mi nun venu al la inoj. Kial ili eklernas Esperanton? Kial ili ĉeestas la renkontiĝojn solaj? Denove mi trovis ke nur malofte ili alportas la familiestron al Esperanto-okazaĵo. Ili kutime ĉeestas solaj la balojn, diskotekojn, kaj muzikajn vesperojn—ĉu pro la pleto de allogaj, ŝajne haveblaj malinoj? Ĉu por renkonti tiajn virojn kiajn ili ne havas hejme, t.e. la virojn kiuj sukcesas eskapi la hejman diktatorecon?

Mi devas konfesi ke la avantaĝo restas ĉe la viroj, ĉar estas facile rimarki ĉu ino havas edzon aŭ ne, pro la edziĝringo, ĉar eĉ se ŝi formetus ĝin oni povus vidi la palan haŭton sur la fingro, dum pri la malinoj estas tute alia afero—ili povas facile kaŝi siajn edziĝstatojn. Certe mi neniam havas problemojn dum la baloj kaj diskotekoj!

Mi neniam rekte demandas al iu ajn kial li aŭ ŝi eklernis Esperanton. Mi preferas daŭrigi la esploradon per observado kaj aŭskultado, kaj la nura konkludo kiun mi atingis ĝis nun estas ke oni aliĝas la movadon pro du kialoj—por la malinoj Esperanto estas eskapilo—por la inoj ĝi estas edzkaptilo (ĉu nova aŭ alies ne multe gravas!)

Ĝus venis al mi la penso ke eble E.A.B. povus reklami Esperanton jene:-

“Lernu Esperanton — la malinan eskapilon!”

aŭ

“Lernu Esperanton — la inan edzkaptilon!”

Kion vi opinias?

Valentino.

JOHANN MARTIN SCHLEYER:  
VOLAPUK

Ĵus aperis ĉe grava germana eldonejo (kiu reeldonis interalie la "Bibliografion de internacia lingvo" de Stojan) represo de la unua libro de Volapük, kun kun Volapük-bibliografio de R. Hauptenthal. En la historio de la interlingvistiko, inter centoj da projektoj nur malmultaj atingis praktikan signifon. Dum hodiaŭ uzata estas nur Esperanto, kreskanta laŭ signifo kaj vastiĝo, en la finiĝanta 19a jarcento Volapük de la badena pastro Johann Martin Schleyer (1831–1912) ĝisvivis rapidan ascendon, kurtan flortempon kaj abruptan falon.

La represo plenumas duoblan celon: represante la unuan lernolibron de Volapük el 1880 ĝi savas la malaperintan projekton el forgeso; kaj la bibliografio de volapüka literaturo donas impreson pri la abunda volapüka verkaro, hodiaŭ apenaŭ alirebla (kun bibliotekaj indikoj). La eldoninto estas: Georg Olms Verlag GmbH, Hagentorwall 7, D-3200 Hildesheim, Okc. Germanujo.

NEKROLOGOJ

Stanley Hardy, Ilford, mortis je la 22-a de Junio post ok semajnoj en hospitalo. Li havis 89-jarojn, Esperantisto kaj ano de B.E.A. dum tre longa tempo, ankaŭ iama delegito de U.E.A. por kristanismo. Al lia edzino Rachel ni kondolencas. Ambaŭ estis fidelaj anoj de la Ilford-Grupo kaj antaŭe de la Havering-Grupo.

\* \* \*

E. J. ("Eddie") Watson, Canvey Island, Essex mortis subite pro koratako je la 5-a de Junio nur 53-jaraĝa. Eddie estis Esperantisto de post 1946 kaj aktivis en Norwich kie li helpis aranĝi la Britan Konferencon en 1966. Li multe instruis Esperanton en Canvey Island. La kremacio okazis en Southend kun ĉeesto de multaj gesamideanoj. Dum la diservo, kiun gvidis Esperantisto de Essex, estis aŭdataj laŭ peto de la familio la tri strofoj de la himno 'La Espero'. Li postlasis edzinon, filinon kaj filon al kiuj ni esprimas kondolencan.

NOVAJ LIBROJ

Tra dezerto kaj praarbaro, de Henryk Sienkiewicz. El la pola trad. Mieczyslaw Sygnarski, Varsovio, 1978. 315p.

Jen vere interesa kaj streĉa rakonto pri la aventuroj de 14-jara pola knabo kaj 9-jara angla knabineto forkaptitaj en Afriko dum la ribelo de la religia gvidanto Mahdi en malfrua 19-a jarcento. La libro supozeble estis verkita por infanoj, sed en la Esperantlingva infanliteraturo oni devas distingi inter libroj por lernantoj kaj tiuj por denaskaj esperantistoj. Nur por ĉi-lastaj taŭgas la nuna libro, sed feliĉe ĝi tre verŝajne interesos ankaŭ multajn plenkreskulojn, aparte pro la viveca priskribado de la Afrikaj pejzaĝoj kaj vivo. La nuna recenzanto trovis mal-facile demeti ĝin por fari necesajn taskojn.

Generale la traduko fluas glate kaj nature, kvankam oni surpriziĝas trovante, en traduko de prof Sygnarski, lingve reviziita de germano kaj hungaro, kelkajn ofteripetitajn misuzojn. Ekzemploj estas *nek* anstataŭ *eĉ ne*; *kovrita per* anstataŭ *kovrita de*; *flamingoj* anstataŭ *flamengoj* aŭ *fenikopteroj*, kaj *si* anstataŭ *li/i*. ("ili permesis al Kambo trompi sin"). Troviĝas ankaŭ kelkaj neklarajoj kiel "Fatmo komencis *frapi kliniĝojn*" kaj "Li ĉirkaŭiris ĝin per la manoj". Oni surpriziĝas ankaŭ kiam la suno "transiris al la *orienta* flanko de la ĉielo", kaj kiam homo "*esperas*, ke li mortos per kruelaj turmentoj"! Sed mi ne volas tro emfazi tiujn makuletojn en vere leginda libro.

J. H. Sullivan.

Ĉu li bremsis sufiĉe? de Johán Valano. TK/Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1978. 128p.

Jen la dua krimromano originale verkita de Johán Valano, kaj la dua esploro far tiu simpatia detektivo Jano Karal. Legintoj de "Ĉu vi kuiras ĉine?" apenaŭ bezonos pluan rekomendon.

Ni troviĝas denove en tiu Sanktavallo, en la urbeto Valmu, kies loĝantoj parolas agrablan, sed ne trudiĝeman,

dialekton (kelkfoja elizio, infinitivo post prepozicio, stumpigita verbo *stas*). Politike potenca arĥitekto kaj ties edzino mortas en aŭtomobila akcidento, kiu tamen tute ne povas esti akcidenta. Kiu povis difekti la mēhanismon? Kiu havis motivon por tio? Ne mankas homoj kun kialo por mortigi la arĥitekton, sed kiel tiuj povus aranĝi la saboton? Abundas rolantoj vigle vivaj, lerte disvolvita intrigo mistifikas la leganton, kaj la solvo kontentigas ĉiujn postulojn. La lingvaĵo de la rakonto kaj de la interparoloj estas flua kaj verŝajneca.

Senrezerve rekomendinda legaĵo laŭ preskaŭ ĉiaj gustoj. Aĉetu ĝin amase, por via distriĝo, kaj por ke la aŭtoro sentu instigon daŭrigi la serion!

*W. Auld.*

**La kanto pri fajr-ruĝa floro**, de Johannes Linnankoski. El la finna trad. E. Kuoppala kaj J. Jänti. Finna Esperanto-Librejo, Kuopio, 1978. 134p. Prezo: £4.35.

Originale verkita en la Finna lingvo, kaj jam tradukita en plurajn aliajn, ĉi tiu libro temas pri junulo, Olavi, vagemo, ĉarma kaj alloga, kiu forlasis sian hejmon por labori inter la flosistoj kiuj prizorgis kaj gvidis la arbajn trunkojn el la arbaroj de Finnlando laŭlonge de la riveroj ĝis la muelejoj. Kun ili Olavi vagadis tra la vilaĝojn kaj urbetojn, renkontante junulinojn laŭvoje kaj pasigante iom da tempo kun ĉiu. Kvar jarojn li vagadis kun la flosistoj, kaj en la dua jaro li renkontis junulinon kiun li ne povis forgesi, kvankam li daŭrigis la "donjuanadon" du plujajn jarojn. Finfine li reiris hejmen kaj komencis labori pri sia propra domo, kaj planis sian estontan vivon kun la neforgesbla junulino. Malgraŭ problemoj el la pasinteco la vivo finfine atingis kontentigan staton.

Ŝajnas ke la verkisto, unu el la plej gravaj en Finnlando, havis neordinaran antaŭvidpovon kaj komprenon rilate al la ina menso tiutempe, kaj pere de la heroo Olavi kaj liaj amatinoj bele kaj ĝuste esprimis la internajn sentojn de ambaŭ. Memanalizado ne estas tiel moderna kiel

oni supozas, laŭ ĉi tiu verko kiu unue eldoniĝis en la jaro 1905. La priskriboj de la Finna pejzaĝo bele bildigas la landon, kaj la metafora komparo de amo kaj la amatinoj al floroj kaj arboj certe ĉarmis ĉi tiun leganton.

La tradukon plejparte faris Jussi Jannti, ankaŭ Finno, kiu, laŭ mi, bonege montras la literaturan vastecon kaj belecon de Esperanto. Ĉi tiu estas ege leginda libro kiun mi rekomendas al ĉiuj, krom komencantoj, por plivastigi la kapablon pri Esperanto.

*Manjo Austin.*

**Antologio de Argentinaj Noveloj**, 18 noveloj tradukitaj el la hispana. 198 paĝoj, ilustrita. Prezo: £2.51 ink. afranko. **Argentina Poemaro**, 18 poemoj, tradukitaj el la hispana kaj itala. 64 paĝoj, ilustrita.

La noveloj de la unua libro povas esti, laŭ mi, pli bone nomitaj rakontoj. Nur du el ili estas sufiĉe longaj por meriti la nomon novelo. Ĉi tiu komento ne forprenas valoron de la libro, male, tio faciligas la legadon al lernantoj kiuj ne kapablas sekvi longan novelon. La rakonto, aŭ mallonga novelo, evoluis en Argentino dum la lasta jarcento kaj ĝi estas grava tradicia parto de la literaturo de tiu lando. La rakontoj baziĝas sur la malfacilaĵoj de la vivo en la izoleca kamparo de Argentino dum la XIX-a jarcento. Tiuj malfacilaĵoj estis aŭ naturdevenaj aŭ homdevenaj. Ĉiuokaze la homoj devis fronti la vivon ofte sen helpo de iu ajn kaj ne estis raraj eventoj tiuj kiel en la rakonto "La Falo". Famaj argentinaj verkistoj uzis la medion de la rakonto por esprimi siajn sentojn; inter ili troviĝis la bonkonataj Güiraldes kaj Quiroga. Tri noveloj de ĉi tiuj verkistoj estas en la libro. Laŭ mi la du plej bonaj rakontoj estas de Ayala Gauna, unu tragika, la alia ironie humura. Ayala Gauna neniam uzis pli da vortoj ol necesaj por verki la rakontojn kaj eble pro tiu ŝparemo li tiel bone tuŝas la koron, ĉu per banalo, ĉu per subtila humuro. La tradukoj de liaj rakontoj estas tre bonaj.

Ĝenerale ĉiu traduko respegulas bone la sentojn de la originaloj.

La libro estas tre leginda kaj bone taŭgas por lernantoj, kiuj volas facilan legadon, tamen kun suko kaj intereso. En la libro troviĝas pluraj nomoj de bestoj, birdoj kaj plantoj kiuj malgraŭ glosado ne estos konataj de eŭropaj legantoj. Tion kulpas la geografia kaj oni devas kompreni, ke Eŭropo estas nur malgranda parto de la mondo.

Pri ARGENTINA POEMARO mi ne estas tiel kontenta. La unua poemo en la libro estas mallonga epopeo kaj bone respegulas la originalon. Estas du tradukoj de "Pli Antaŭen!", originale verkita en la itala, la leganto povas decidi kiun li preferas, tamen mi avertos ke la unua estas la pli fidela al la originalo. En kelkaj poemoj la tradukoj ne esprimas la tutan senton de la verkoj kaj tiu manko ĝenis min ĉefe pri la du poemoj de Storni. La tradukisto aŭ ne trafas la sentojn de la poetino aŭ li ne povas esprimi ilin en Esperanto. Eble viro ne kapablas traduki poezion verkitan de virino! Kaj mi ne konsentas kun la "poeziaj licencoj" de EdeB metante *j* anstataŭ *i* por produkti vortojn kiel *ŝfancino* kaj similaj. Kial fari tion? En la libro troviĝas traduko de unu el la plej virŝovinistaj poemoj kiujn mi iam ajn legis. EdeB bone tradukis ĝin. Ĉu tio montras lian maltrafon kun Storni?

Bedaŭrinde la tipografio de ambaŭ libroj ne estas tre agrabla kaj la ilustraĵoj tolereblaj en la NOVELOJ agacas en la POEMARO.

*Amador Díaz.*

**Libro de amo**, de Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos, 1969. 262p., broŝ.

"Libro de amo" estis siatempe pionira verko, kaj restas verko klasika. Tiu libro donas kontentigan respondon al la ofta demando: "Ĉu ekzistas 'fivortoj' en Esperanto?". Preter ĉio, tiu libro ebligas rebaton al la pretendo, ke nur la "propra" lingvo povas ĝisviscere skui.

La nuna, ŝajne nova eldono estas

broŝurita, sed alie ĝi retenas la malnovan formon, kun la fikcia antaŭparolo, la pseŭdonimoj, la avertoj kaj apologioj. Se iu kredas, ke tia zorgo ellaborita, kvankam diafana sekreteco ne plu necesas, tiu memoru, ke ankoraŭ hodiaŭ milda seksualudo povas indignigi legantojn de BE, kaj Libro de Amo temas pri pli ol seksualudoj . . .

La unua parto, "Sekretaj sonetoj", estas amidilio, erotike eksplicita, tamen idilio. Ĝi rakontas la historion de unu paro, kiel geamantoj kaj geedzoj, de la unua renkontiĝo ĝis gravediĝo. La poeto emfazas, ke la amo sen la amo estas eĉ "naŭza", sed li ne subtaksas la erotikon, tute ne. Li estas misiisto rilate al la amorarto, se ne al la pozoj. La unua parto ankaŭ enhavas klarigajn versojn, sprite faritajn, pri vortoj tiam novaj, nun plejparte bone konataj.

La dua parto sekvas vojojn pli diversajn, por ne diri deviajn, kaj ĝuste pro la diverseco, tiu dua parto disipiĝas, ne atingas la koncentritan pasion de la unua aŭ tiel "pentras", sed paradokse, dum en la unua parto unu virino elvokas gamon, en la dua multaj virinoj elvokas monotonon. La sekcioj estas tro multaj por detala priskribo en mallonga recenzo, troviĝas pastičoj, tradukoj, originalaj poemoj, fragmentoj. Inter la fragmentoj ("Oaristoj") mi trovis la plej efikajn versojn, inter la "Tristrekaĵoj miniaturoj" la plej banalajn, preskaŭ trivialajn. Oni pleje profitas el ambaŭ partoj legante la unuan kontinue kaj frandante la duan intermite. Mi bonvenigas la revenon de "Libro de Amo" kaj forte rekomendas ĝin por forpeli la humoron, en kiu mi verkis la poemon "De tag' al tago".

*Daphne Lister.*

**Streĉita kordo**, de K. Kalocsay. Budapest, 1931, represo de Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1978. 196p.

Ĉiam konsternas min Esperanto-eldonado. Kiun celas tiu ĉi libro? Kalocsay estis genia tradukisto; sed, kvankam pluraj poemoj en "Streĉita Kordo" estas majstraj, li restas malfacile

legebla poeto. Precipe pro *datoj*: kion pensos nova leganto, vidante antaŭ poemo '1923', kiam ĉiaj modernismoj floris tra la mondo? Kiel rilatis E-o al tiu mondo? Estus alia afero, vidi ke en tiu jaro iu profunde legis kaj tradukis tiun aŭ tiun poeton! Do mi petas de eldonantoj pluajn Kalocsay-*tradukojn*, ekz. el Attila József (aŭ eble reeldonon de Kurzens).

*Kris Long.*

**Esperanto and International Language Problems: A Research Bibliography**, de Humphrey Tonkin. 4a eld., reviziita, 1977. Esperantic Studies Foundation. 45p. Prezo: £1.35.

Jen legebla (kaj leginda) bibliografio, kun pli ol 200 paragrafoj pri temoj kiel la elekto de lingvo en nova ŝtato aŭ la motivoj de E-lernintoj, ĉiu kun frazoj pri pluraj verkoj.

Tia libro povus esti tendenca: kial inter "Dia Regno", "Espero Katolika" kaj "Oomoto" mankas "Kvakera Esperantisto"? — verŝajne hazarde. Sed, pli grave, kial prisilenti "Hamburĝon en Retrospektivo"?

Kaj ĝi povus trompi: ho ve, la listo de anglalingvaj aŭtoroj, el kiuj ekzistas E-tradukoj, supozigas aŭ ke dum 50 jaroj oni nenion plu tradukis, aŭ ke oni nun domaĝas pagon por kopirajta verko! Verŝajne malmultaj legantoj kontrolus, kioma eldono aŭ (bedaŭrinde!) kia traduko . . . do estus facile aldoni ion pli aktualan, ĉu ne?

En tiu ĉi 4-a eldono, ĉu ne estus bone, montri (ekz. per streko marĝene), kio estas nova?

*Kris Long.*

**Kara diablino**, de Douglas P. Boatman. TK/Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1979. 110p.

Jen la aŭtoro de "La nekonata konato" regalas nin per sia dua romano. Ĝi estas amuza; pri la intrigo mi tamen ne volas diri multon, ĉar tio eble reduktus la plezuron de la unua lego. Mi diru nur,

ke temas fundamente pri pli ol ordinare intima rilatiĝo inter viro kaj virino! Ĝi estas ankaŭ tre fantazia, sed tio, ĉu ne, estas avantaĝo, kiam temas pri distra verko!

Mi ne estas tre pedanta persono, sed unue min ĝenis kaj poste ŝoketis la terure multaj anglismoj en la stilo — gramatikaj (ofta manko de akuzativo post *kiel*; *anstataŭ kliniĝante* kie normala Esperanto postulas *anstataŭ kliniĝi*; ktp) kaj semantikaj (*intriga* ne signifas "intriguing"; kion signifas *alerta*? ktp). Trudiĝis al mi tiu kritiko far unu nia oponanto: "La Esperanto-parolanto . . . probable alportas en la interagadon de ĝiaj signifoj multajn nuancojn de lia denaska lingvo, nuancojn, kiuj estos neekzistantaj por homoj kun malsimila fono". En la kazo de Boatman tiu kritiko estas trafa, kaj dank' al dio, ke tiu kazo estas maloftaĵo, aŭ Esperanto estus en kriza stato. Ĝenas precipe, ke tiu fuŝo estintus evitebla per kontrolo de alilingva (aŭ eĉ anglalingva!) kompetentulo. Tiam kontrolon havigas al si tre multaj aŭtoroj kaj eldonistoj.

Ĉu malgraŭ tio mi finlegis la romanon? Ho, jes; nepre. Kaj tion faros ankaŭ vi. Sed estu avertita!

*W. Auld.*

**Iŝmael Gomes Braga**, de Zêus Wantuil. Federacao Espirita Brasileira, Rio de Janeiro, 1971. 41p.

Tro malofte la meritplenaj esperantistoj ricevas taŭgan nekrologon rekonon. Dank' al la spiritisma movado en Brazilo, Iŝmael Gomes Braga estas escepto. En 1981 la U.K. okazos en lia lando, kaj oni devas rekoni, ke Gomes Braga estas elstare unu el tiuj pioniroj, kies fervora laboro ebligis tion. Tiu ĉi libreto atestas, kiom povas atingi unu homo por Esperanto, se li nur sin dediĉas kaj ne timas. En la panteono de nia movado li meritas honorindan lokon, kaj estas ĝojige, ke la libreto — en simpla sincero — registras liajn atingojn, kaj lian personecon.

*W. Auld.*

# ANONCETOJ

3p por ĉiu vorto. Minimume 45p. Antaŭ-pagenda.

"GUTARO" – poemoj de Avoto (A. W. Thomson, Welling), fondinto de Skolta Esperanto-Ligo kaj Sudorienta Federacio – kun interesa eseo pri la arto de poezio. £1.40.

Kio estas SAT? Sennacieca Asocio Tutmonda bonvenigas informpetojn. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB.

Are you using your insurance to help Esperanto at no cost to yourself? If not, please write to G. D. Carter, 51 Wyche Road, Malvern, Worcs.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelsip and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from Norman Williams, M.A., B.Sc., 237 Two Trees Lane, Denton, Manchester, M34 1QL.

**SCOUTS!** Join the Scout Esperanto League. Enquire 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE.

**MOTORISTS!** Join the International Motorists Club (IEKA). Life Membership £1.65. British Representative: J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex, RM14 3DS.

*Volas korespondi:*

19-jara hungaro. Lajos Vajo, H-2040 Budaors, Levastrato 33.VII.68. Hungario pri naturo, amo, vojaĝo, junularo, muziko kaj legado.

18-jara studentino F-ino Veronica N. Gombach, Dr. Carbone 3215, 1676 – Santos Lugares, Buenos Aires Republica Argentina. pri muziko, opero, teatro kaj turismo.

27-jara ŝipano. Billy R. Waldon, O.I.Div. USS Midway CV-41, FPO. S.f, CA 96601 USA pri libroj, ĵurnalismo, bildorakontoj.

19-jara studento. Hosein MEYARI, Hesarak-6, Bahman St. Porfeshan CO. Karaj, Irano volas korespondi por plibonigi sian Esperanton – lernanto. Interesiĝas pri muziko, kino, poŝtmarkoj, sportoj.

26-jara. Krzysztof Mikulski, 293 720 Drogobytch, Gagarin Street 130/4, USSR. UKRAÏNE pri fremdlingvoj, aŭtomobiloj, radio, kaj skribi leterojn.

## Anti-Ro Attitudes

**NATIONAL ATHEISTS** who believe that the human race is rightly "culled" by war, and who therefore accept the possibility of atomic destruction, logically oppose Ro.

**OTHER ANTI-RO ATTITUDES** often result from lack of integrated thought. This can be remedied by reflection.

**ON WHAT IS YOUR ATTITUDE BASED?** Do you oppose Ro World Government because you consider the absorption of the many into one an impossibility? But it has actually occurred over and over again throughout history e.g. in England in the 10th century, in N. America (formation of U.S.A.) in the 18th century. Do those who admit such developments regret them and wish to go back to former disunity? Is it that they believe unity right when achieved but wrong when attempted? Perhaps they swallow the silly Communist claim that a World State must be Communist. If a Communist World State develops, whose fault will it be now that Ro is here as the sensible alternative to Anachronistic Atheist Nationalism?

Ro is short for  
Regnego. Write for  
The Mitchell Report.



The Ro Organizer,  
BM/World State House,  
London W.C. 1.